

D 39
TIFLISANO

DRUSELO
POEMARO

Prezo : 25 centimoj.

PARIS

L'UNIVERSALA

IMPRIMERIE OUVRIÈRE ESPÉRANTISTE

20, rue du Cloître-Saint-Merri, 20

1911

Kristo



*En la Floraj Ludoj tin ĉi
poemo celis gajni naturan
floron, kiun ricevis « Simbolo
de l'Amo ».*

En lando varmega, kuŝanta trans maro,
De kie la suno leviĝas,
Sen ia kreskaĵo, sen ia arbaro,
La monto dezerta troviĝas.

Sed estis la tempo: kreskaĵo floranta
La monton tre bele kovradis;
Kaj ofte ĉi tie popolo sidanta
La majstron amatan aŭdadis.

En mondo li sola, fidela ĝis morto
La vojon de l'amo klarigis,
Kaj kiel mem Dio, per ago kaj vorto
Li mondon ĝis fino tremigis.

Kaj li paroladis: infanoj, kun ĝojo
Aŭskultu parolon vi mian;
Al via feliĉo ekzistas la vojo —
Nur amu vi unu la alian!

Ne zorgu alion: se birdo ĉiela
La morton malsatan evitas —
Des pli vi en mondo mirinda kaj bela
Eĉ panon, eĉ vivon meritas!

Kaj kia profito al homo sur tero
Se li tutan mondon havigos,
Kaj sin de la zorgo kaj de la sufero
Turmentos kaj kordolorigos?

Por kio vi tagon venontan atendas
Kun timo kaj kora doloro?
De l'tempo feliĉo neniam dependas,
Ĝi sole dependas de l'koro!

Nenion atendu: vi, nun suferantoj,
Nun amu, nun estu amataj
Kaj vi feliĉigos: malestos plorantaj
Kaj panon ricevós malsataj.

Forgesu pri ĉio estonta kaj morta;
Vin sole oferu al fratoj;
Eĉ amo malestas pli bela, pli forta
Ol morto por siaj amataj!

De mi alportita la fajro ĉiela
Nun savu de l'mondo fariĝos;
Kaj kia min premas doloro kruela
Dum kreskos ĝi kaj ekflamiĝos!

Sed fajro mirinda de l'amo kaj vero
De nun viajn korojn bruligu;
Kaj fulmosimile sur tuta la tero
Ĝi brilu kaj mondon lumigu!

Jen, kvazaŭ la ŝafojn, vin sole mi sendas
Pacigi severan lup-rondon;
Kaj, malgraŭ en mondo vin ploro atendas —
Kuraĝu: mi venkis la mondon!

Vi iru, lumigu per lumo de l'amo
La vivon de l'ĉiuj premataj;
Vi estu al mondo plej bela ornamo,
Kaj estu feliĉaj, amataj!...

Tunis 1909.



Kredo.



Forgesante estontecon,
Ĉar senĉese trompas ĝi,
Mi atendas feliĉecon
Nur de l'vivo, tie ĉi.

Mi hodiaŭ estas reĝo,
Ĉar aminda amas min:
Mia trono — mia seĝo
Apud mia amatin'!

Erariga estonteco,
Malaperu de mi for!
Estas nuna feliĉeco
Pli agrabla por la kor'!

Mizerulon por hodiaŭ
Pli ĝojigas unu *groŝ'*
Ol miliona laambio
Por estonto en la poŝ'.

Paradizo — por la pastroj;
Por famuloj — granda glori;
Mono — por la bonaj mastroj,
Kaj por mi — nur — via kor'!

Amu min kaj vivu ĝoje
Amatino mia nun;
Ĉio pasas; duafoje
Ni ne vivos sub la sun'.

Parizo 1909.



Tiflisaj kantetoj.



Amatino, kien vi
Malaperis for de mi?
Apud kiu nun sidas
Kiun varme karesas?

Amatinon mi dezirus
Por dum vivo min ĝojigus;
Se mi mortos — post mi irus —
Min kun ploro enterigus.

Malsaniĝis mi de l'amo,
Pereiĝas de la sorto:
Aŭ donacu al mi sanon,
Aŭ kondamnon pro la morto!

Vivi mi ne plu deziras;
Proksimiĝu, mia morto,
Ĉar sekvante ĉien iras
Post mi nigra mia sorto!

Ah, suferas la popolo!
Kio povas min ĝojigi?
Dio, kie via volo
Estas por nin liberigi?

Amikaro senegala,
Jam sufiĉas la sufero:
En fumado nur batala
Brilas via la libero!

Vi leviĝu kaj de l'vojo
Malamikon forkurigu:
Por feliĉo, por la ĝojo
Vin denove revivigu!



Budda.



Tra granda, dezerta, malluma montaro
Moviĝis sub pluvo kaj tondra bruego
De l'nudaj vagistoj mizera la aro
Al Gango-rivero de malproksimego.

Iliaj la korpoj malgrasaj nigriĝis
Senĉese sentante la pluvon kaj venton;
Du tagojn en vojo vagistoj moviĝis,
Ne vidis la fajron, rifugan tegmenton.

Subite sub pluvo kaj tondroj bruegaj
Preĝejo dezerta kaj sola montriĝas;
Envenas vagistoj sub arkoj altegaj
Kaj tie de l'tondro kaj vento kaŝiĝas.

Kaj antaŭ vagistoj sur alta la trono
Jen Sakia Muni — la ŝtona giganto;
Ĉe Sakia Muni en ora la krono
Brilegas grandega, mirinda brilanto.

Kaj unu parolas : ho, fratoj, dum vento,
Dum nokta mallumo malestas gardanto,
Kaj multe da pano, kaj multa arĝento
Ĉe ni ekaperos pro granda brilo.

Ne estas necesa al Budda ĉi tio ;
Pli bela, ol ŝtono, lumadas la stelo
Kaj estas do Budda la reĝo kaj Dio
De l'tuta stelaro en granda ĉielo.

Kaj ĉiu konsentas al tiu la ŝtelo ;
Sed nur la sanktaĵon apenaŭ tuŝetas —
La fajro kaj tondro de l'tuta ĉielo
Malsatan amason tuj reen forĵetas.

Nur unu en tiu terura momento
El nuda amaso kuraĝe eliras
Kaj inter mortiga, komuna silento
« Vi estas maljusta! » — al Budda li diras.

Aŭ viaj lipastroj mensogas, dirante
Ke vi estas bona, malsatan satigas,
Pardonas la kulpojn, la homon amante,
Kaj kiel la suno, mallumon forigas.

Do pastroj mensogas : vi estas venĝema :
Pro ŝtono mizera vi homon punadas ;
Vi super amaso malforta, timema
Terure la tondrojn kaj fulmojn ĵetadas !

Ho, hontu do, hontu, ĉielposedanto !
Aperas vi kiel severa juĝanto ;
Kun fulmo kaj tondro kaj vento vi venas
Kaj de l'mizeruloj la panon forprenas !

La reĝo de l'reĝoj ! El nigra nebulo
Ekbatu la tondron vi en frenezelo :
Jen, kiel egala, kun koro ribela
Mi staras ĉe via rigardo kruela !

Kaj kun fiereco esprimas la veron,
Kaj estas la vero sincera kaj ĝusta :
Mi ĵuras ĉielon, mi ĵuras la teron —
Despoto de l'mondo, vi estas maljusta ! —

Li finis kaj tiam miraklo fariĝis :
Por ili atingu la ŝtonon brilantan
Statuo de l'Budda tuj mem alkliniĝis
Kaj metis sur teron la kapon gigantan.

Kaj antaŭ mizera amaso vaganta
Nun estis mem Dio en polvo kuŝanta !

Parizo 1909.



Diversaĵoj.

©

La verda steleto mirinda
Sur via la brusto sin trovas;
Sed vian belecon, aminda
Mem suno superi ne povas!

.

Estas ĝoja mizerulo
Orminejon eltrovinte;
Kaj pli ĝoja feliĉulo
Estas mi, vin ekvidinte.

.

Esti fama kaj genia
Estas vere bela sorto
Sed pli bela esti via
Simpla sklavo ĝis la morto.

.

Nek muziko melodia
Nek la kanto de l'poeto
Faros, kion faros via
Enŝorĉiga ekrideto.

Estas vi nur mia stelo;
Estas mia vi genio;
Ĉar en vi kuniĝis belo,
Poezio, harmonio!

.

Ah, por kio vi ornamas
Mian bruston per la floro?
Sur la brusto mi nur amas
Vian bruston kun la koro!

.

Kaj pli belan, ol la floro,
Mi deziras brustornamon:
Volas, volas mia koro
Vian amon, vian amon!

Sevilla.



Katalanujo.

©

Katalanujo
La lando bela,
Ĉarma popolo,
Forta, ribela!

Min viaj filoj
Vere ĉarmigis;
Viaj filinoj
Min frenezigis!

Ah, kun la ploro
De l'vi mi iras;
Bonon de l'koro
Al vi deziras!

En Oriento
Mi nun vivados,
Kaj kun amsento,
Vin memorados!

Estu vi riĉa
Per ormoneroj;
Estu feliĉa
Per la libero!

Kara popolo
Vivu, floradu,
Kaj kelkafoje,
Min memoradu!



(El rusa lingvo).

©

Hodiaŭ lasta vespereto
Amikoj, ĝojas mi kun vi;
Kaj morgaŭ frue, kun lumeto,
Ekploros mia famili'.

Ekploros patro kaj patrino,
Ekploros frato kaj fratin',
Ekploros mia amatino
Kisante lastafoje min.

Alvenos nigra veturilo;
Amikoj staros kun la plor'...
Kaj la ĝendarmoj kun pafiloj
Arestos min kaj prenos for...

Lausanne 1909.





Idisto.

@

En sonĝo mi vidis Idiston
Kun vangoj malsekaj de ploro,
Kaj petis ploraute li Kriston
Pri venko, sukceso kaj gloro.

Li preĝis : ho, Kristo-Diido,
Ne plu Esperanton subtenu,
Subtenu aferon de l'Ido,
La idon vivigu kaj benu.

Tiele preĝadis Idisto
En sia ĉambreto ĉe tablo.
Sed aŭdis subite de Kristo :
— Foriru de mi, ho, Diablo!

Barcelono.

